## УРОК 5 – LECIONO 5

**Грамматика – Gramatiko**



– **aĵ** – суффикс, обозначающий конкретный предмет с определенным признаком, вещь из определенного материала: memor**aĵ**o – памятная вещь, nov**aĵ**o – новость, Esperant**aĵ**o – вещь, имеющая отношение к эсперанто (например: значок, открытка, флажок);

**for** – наречие, которое может употребляться и в качестве приставки, обозначает удаление, удаленность, удаление: **for**esto – отсутствие, **for**porti – унести, **for**e – далеко, **for**a promeno – дальняя прогулка;

– **ul** – суффикс, обозначающий лицо, обладающее определенным качеством: scienc**ul**o – учёный, jun**ul**o – юноша, petol**ul**o – баловник, шалун;

**si** – возвратное местоимение, употребляется только в 3 лице в винительном падеже или с предлогом; самостоятельно это местоимение не употребляется. Knabo defendas **sin** de kolera hundo. Мальчик защищает себя (защищается) от злой собаки. Egoisto amas nur **sin**. Эгоист любит только себя.

**sia** – притяжательное местоимение обозначающее «свой». Bona patrino amas **sia**n infanon. Хорошая мать любит своего ребёнка. Li iris al **sia** domo. Он пошел к своему дому.

Сравнительная степень прилагательных и наречий образуется с помощью слов **pli** … **ol** (более … чем), **malpli** … **ol** (менее … чем). Blanka kato estas pli simpatia ol nigra kato. Белый кот симпатичнее (более симпатичный), чем чёрный кот. Mia frato estas malpli juna ol frato de Sofia. Мой брат моложе (более молодой), чем брат Софии. Pli bone ridi, ol plori. Лучше смеяться, чем плакать.

Превосходная степень прилагательных образуется с помощью наречия **plej**, употребляемого с артиклем **la**: Ŝi estas la plej bela en nia grupo. Она – самая красивая в нашей группе. Liaj ideoj estis la plej geniaj. Его идеи были самыми гениальными.

Превосходная степень наречий образуется с помощью наречия **plej**, в основном, без артикля. Plej interese estas legi librojn. Интереснее всего – читать книги. Plej ofte mi aŭskultas klasikan muzikon. Чаще всего я слушаю классическую музыку.

**Задания – Taskoj**

***I. Прочитайте текст «Tagmanĝo de Miĉjo» и назовите русский эквивалент следующих слов с интернациональными корнями:*** apetito, botelo, frukto, salato, supo, utila.

## Tagmanĝo de Miĉjo



– Oĥ, jam estas tagmezo! Restu, geknaboj, vi vidos, kiel Miĉjo tagmanĝas, – diris la kuracistino Lidia, – Boĉjo, ni portu la tagmanĝon!

Ili duope foriris al la kuirejo. La unua revenis Lidia. Ŝi alportis teleregon da salato brasika kaj karota. Ŝi metis la teleregon apud Miĉjo:

– Manĝu. Manĝu, karulo!

Miĉjo ŝovis sian longan rostron en la salaton, kontente flaris kaj komencis manĝi. Ĝi lerte prenis la salaton per la rostro kaj metis en la buŝon. Ĝi manĝis kun apetito.

– Salato estas la plej utila manĝaĵo por Miĉjo, - diris Lidia. – Boĉjo, rapidu!

El la kuirejo aperis Boĉjo. Li alportis sitelon da terpomoj, ankoraŭ varmaj. Lidia prenis boteleton kaj kuleron. Du kulerojn da kuracaĵo ŝi aldonis en la sitelon. Poste ŝi prenis pli grandan botelon kun oleo, verŝis la oleon en la sitelon kaj donis la sitelon al Miĉjo:

– Kresku granda kaj sana!

Boĉjo donis al la mamutido sitelon da akvo. Miĉjo fortrinkis duonon, prenis plenan rostron da akvo kaj ŝprucis al Boĉjo. Ekridis la infanoj.

– Ĝi petolas, kiel ĉiu infano! – diris Lidia.

Krim kaptis la manikon de Boĉjo.

– Venu al mi, malsekulo! – flustris li. – Jen tion ĵetu morgaŭ en la akvon... – li ŝovis al Boĉjo blankan tablojdon.



**sitelo**

– Uhu! – respondis Boĉjo.

– Nu, geknaboj, ĉu vi mem ne malsatas? Rapidu al hejma tablo. Ankaŭ vin atendas via tagmanĝo. Sed revenu ofte, ĉar Miĉjo enuas sola.

***II. Ответьте, соответствует ли заголовок содержанию рассказа? Попробуйте самостоятельно озаглавить этот текст.***

***III. Найдите ответы на вопросы.***

Kion manĝis Miĉjo? Kial venis Krim al la tagmanĝo de Miĉjo?

***IV. Выберите предложения, характеризующие поведение Миши во время обеда.***

***V. Составьте предложения, соответствующие содержанию рассказа, соединив правильно части A, B, C и D. Полученные предложения запишите.***

| A | B | C | D |
|---|---|---|---|
| Lidia | alportis | la rostron | apud Miĉjo. |
| Ĝi | kaptis | la manikon | da terpomoj. |
| Boĉjo | prenis | la salaton | en la salaton. |
| Miĉjo | ŝovis | la teleregon | per la rostro. |
| Krim | metis | sitelon | de Boĉjo. |

***VI. Найдите в тексте «Tagmanĝo de Miĉjo» слова с суффиксами - aĵ-, -ul-. Что они обозначают?***

*1. От каких слов образованы следующие слова? Переведите их.*
– bonaĵo, esperantaĵo, rubaĵo, aĉetaĵo, trinkaĵo, ŝmiraĵo;
– junulino, sentaŭgulo, bonulo, kriplulo, milionulo, belulino;
*2. Составьте предложения с вышеперечисленными словами.*
*3. Обратите внимание на слова, в которых находится слог, похожий на суффикс:* okulo, tabulo, regulo.

***VII. Переведите, используя лексику данного урока.***

Я жду тебя в парке. Дети растут быстро. Мы часто готовим картофель. Она ставит бутылку масла на стол. Что вы едите на обед? Мама хочет, чтобы её сын был сыт и здоров. Моя бабушка осталась одна дома. Петр берет ложку и ест с удовольствием суп из тарелки. В полдень они торопятся на урок эсперанто. Она бросает мяч, он ловко его ловит. Капуста, картофель, салат, морковь – овощи.



***VIII. Прочитайте текст «En restoracio». Обратите внимание на новые слова. Найдите их значение в словаре:*** pomo, pano, terpomo, papriko, piro, kukumo, celerio, kuko, ĉerizo, maizo, pipro, legomo, petroselo, juglando, pizo, mustardo, taso, forko, tuko, bongusta, elekti, sata, tranĉi, trinki.

## En restoracio

Post la interesa ekskurso mi kaj miaj geamikoj vespermanĝis en malgranda restoracio en centro de la urbo. Do, ni eniris kvarope en komfortan halon. Apud la fenestro estis libera tablo. Ni eksidis ĉe la tablo kun blanka tablotuko. En mezo de la tablo staris belaj floroj en vazo. Sur la tablo kuŝis buŝtukoj kaj manĝilaro: forkoj, tranĉiloj, kuleroj. La menuo enhavis multajn manĝojn. Ni havis tre varian elekton. Kelnero servis nin.

Unue, kun apetito ni manĝis ŝinkon kaj salatojn el diversaj legomoj: tomatoj, kukumoj, maizo, papriko kaj petroselo. La varma kokinaĵa buljono estis ege bongusta. Ni preferis ĝin al barĉo. Poste la kelnero alportis porkaĵon kun terpomoj. Unu el miaj geamikoj prenis duoblan porcion da terpomoj. Fine, mi trinkis taseton da kafo kun sukero. Miaj geamikoj manĝis glaciaĵojn kun piroj, pomoj, ĉerizoj kaj juglandoj. Ni restis tre kontentaj pro nia komuna vespermanĝo.



**taso da kafo kun sukero**



*1. Ответьте на вопросы.*
Kiam okazis la vespermanĝo? Kie manĝis geamikoj? Kie ili eksidis? Kio staris en vazo? Kio kuŝis sur la tablo? Kion enhavis la menuo? Kiujn salatojn manĝis la geamikoj? Kia estis la buljono? Kion alportis la kelnero? Kiu prenis duoblan porcion da terpomoj? Kion manĝis kaj trinkis geamikoj por la deserto? Ĉu la komuna vespermanĝo estis agrabla?
*2. Подготовьте устный рассказ о вашем обеде (ужине).*

***IX. Прочитайте слова и определите, какое из них лишнее*:**

– salo, pomo, supo, lakto, ovo;
– forko, tranĉilo, kulero, buŝtuko, tekulereto.

***X. Запишите следующие пословицы и поговорки. Переведите их и найдите их русский эквивалент.***

Dum manĝado venas apetito.
Kiu tre malsatas, tiu ĉion ŝatas.
Ne gutas mielo el la ĉielo.
Akvo kaj pano servas al sano.
Tablon ornamas ne tuko, sed kuko.

***XI. Прочитайте вслух и выучите стихотворение поэтессы Людмилы Евсеевой.***


**bulbo**

**La kuiristo**

Dank'al volo kaj persisto
Mi fariĝis kuiristo.
Jen karoto, beto, rapo,
Celerio, blanka napo.
Jen terpomo kaj brasiko,

Petroselo kaj papriko,
Salo, pipro kaj mustardo,
Rozkolora pec' de lardo.

Bulbo... ne-e-e! Mi ĝin ne tuŝos,
Ĉar okuloj tuj ekduŝos.

***XII. Напишите фразы, употребляя прилагательные:***

*1) в сравнительной степени.* La arbo estas (+ alta), ol la domo. Ĝardeno estas (– granda), ol la korto. Mi estas (+ juna), ol Maria. Somero estas (+ varma), ol printempo. Mia frato estas (– forta), ol via kuzo. Aŭtuno estas (– malvarma), ol vintro. Mia blua robo estas (+ bela), ol mia nigra robo.

*2) в превосходной степени.* Mia ĉambro estas (++ hela) en mia domo, sed ĝi estas (– – malgranda). Li estas (++ juna) sportisto de nia teamo. Aŭgusto estas (++ varma) monato. Februaro estas (++ kurta) monato. (++ eta) eraro de alpinisto

povas esti tragika. Kiu urbo en Rusio situas (++malproksime) de Moskvo? Plutono estas (– – malgranda) planedo.

***XIII. Спишите фразы, вставляя вместо точек*** **si, sia, sian, siaj, siajn.**

1. Li mendis por ... edzino novan veston. Lia edzino mendis por ... novan veston.
2. Tom legas ... libron. Li aĉetis al ... interesan romanon. 3. Bardoj prezentas kutime ... verkaĵojn. Ofte ili restas en ... hejmoj kaj kantas. 4. Vespere li restis en .... hejmo. 5. Ŝi vidas ... en la spegulo. 6. Li ankoraŭ ne vidis ... novan domon. 7. La gepatroj revenis al ... malfrue. 8. Ili ne volas paroli kun ... najbaroj. 9. La knaboj ŝatas ... ludojn.

**Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

*Задание VII – Tasko VII*
Mi atendas vin en la parko. Infanoj kreskas rapide. Ofte ni preparas terpomojn. Ŝi metas la botelon kun oleo sur la tablon. Kion vi tagmanĝas? Panjo volas, ke ŝia filo estu sata kaj sana. Mia avinjo restis hejme sola. Petro prenas kuleron kaj kun plezuro manĝas supon el la telero. Tagmeze ili rapidas al leciono de Esperanto. Ŝi ĵetas pilkon, li lerte kaptas ĝin. Brasiko, terpomoj, salato, karotoj estas legomoj.

*Задание IX – Tasko IX*
– supo;
– buŝtuko.

*Задание XII – Tasko XII*
1. La arbo estas pli alta, ol la domo. Ĝardeno estas malpli granda, ol la korto. Mi estas pli juna, ol Maria. Somero estas pli varma, ol printempo. Mia frato estas malpli forta, ol via kuzo. Aŭtuno estas malpli malvarma, ol vintro. Mia blua robo estas pli bela, ol mia nigra robo.
2. Mia ĉambro estas la plej hela en mia domo, sed ĝi estas la plej malgranda. Li estas la plej juna sportisto de nia teamo. Aŭgusto estas la plej varma monato. Februaro estas la plej kurta monato. La plej eta eraro de alpinisto povas esti tragika. Kiu urbo en Rusio situas la plej malproksime de Moskvo? Plutono estas la plej malgranda planedo.

*Задание XIII – Tasko XIII*
1. Li mendis por sia edzino novan veston. Lia edzino mendis por si novan veston.
2. Tom legas sian libron. Li aĉetis al si interesan romanon. 3. Bardoj prezentas kutime siajn verkaĵojn. Ofte ili restas en siaj hejmoj kaj kantas. 4. Vespere li restis en sia hejmo. 5. Ŝi vidas sin en la spegulo. 6. Li ankoraŭ ne vidis sian novan domon. 7. La gepatroj revenis al si malfrue. 8. Ili ne volas paroli kun siaj najbaroj. 9. La knaboj ŝatas siajn ludojn.